



Esperanto 80

# Okdek-anoj Ĉe l' Papero

Nova eldono 2004 • n-ro 10a

La gazeto de la membroj de l' asocio Esperanto 80

Oktobro – Octobre 2004

Le journal des membres de l'association Esperanto 80

**Rendez-vous important!  
Atentu! Grava rendezvuo!**

## Réunion Conviviale – Gasta kunveno

**N'oubliez pas de venir**

à la réunion conviviale qui aura lieu :

**le Vendredi 5 novembre 2004 dès 18h30, salle des Tilleuls à Salouël (derrière la Mairie).**

Surtout n'oubliez pas, si vous souhaitez participer au repas qui aura lieu ce soir-là, de téléphoner à Daniel au 03 22 47 30 11 avant le mercredi 3 novembre 2004 au soir. Ce sera pour vous l'occasion de rencontrer une locutrice de l'espéranto un peu spéciale qui viendra faire une conférence directement dans la langue, qui sera traduite en direct (voir ci-dessous).



## Une rentrée réussie... Sekcesplena reveno...

La unua rendezvuo de aŭtuno estas tiu unua gasta kunveno okazonta la unua de oktobro.

Tiun tagon okazis momento akcepti novajn membrojn aŭ interesatojn de la lingvo Esperanto. Bedaŭrinde tiu ĉi numero de «Okdekanoj ĉe l' papero» vin trafos post tiu dato pro temp-organizado problemoj. Malkovru tuj poste ĉe la dua paĝo sukcesojn de la reveno.

La vera venonta gasta kunveno, pri kiu mi povas al vi laŭleĝe paroli estas tiu de la 5a de novembro 2004. Tiuokaze venos Marie-France Conde-Rey por paroli en Esperanto pri Esperanta Civito (Esperantio) pri kiu ŝi estas sekretariino kaj senatanino. Notinde estas, ke en la venonta numero mi faros specialan dosieron por ke vi antaŭsciu almenaŭ iom pri ŝi, pri la Esperanta Civito, kaj pri ŝia rolo en tiu afero.

Cyrille

En Esperanto 80, ĉiam sternas ni tablaĵn paperfoliojn, antaŭ ekmanĝo.

Le premier rendez-vous de l'automne est celui de notre première réunion conviviale du premier octobre.

Cette journée aura été le moment d'accueillir de nouveaux membres ou intéressés par la langue espéranto. Malheureusement ce numéro d'«Okdekanoj ĉe l' papero» vous arrivera après cette date à cause d'un problème de planification de temps. Découvrez dès la page 2 les succès de cette rentrée.

La prochaine vraie réunion conviviale dont je peux légitimement vous parler est celle du 5 novembre 2004. À cette occasion Marie-France Conde-Rey viendra parler en espéranto de l'Esperanta Civito dont elle est secrétaire et sénatrice.

Je dois souligner qu'à cette occasion pour le numéro de novembre je ferai un dossier spécial, pour que vous sachiez au moins avec un peu plus de détails qui elle est, ce qu'est l'Esperanta Civito, et sur son rôle dans cette organisation.

Cyrille



Chez Espéranto 80 on met toujours des nappes de papier sur les tables avant de se mettre à manger.

# En AGORA, ni agoris... Kia agorado!

En septembro la 19an, okdek-anoj deĵoris kelkaj esperantistoj en AGORA Pretigis nin por unu-taga ĉeesto en Mégacité, kie la asocio pri la asocioj de Amieno okazigis jaran renkontiĝon de komunikado kaj varbo.



Mi, ĉe la budo en AGORA, tenanta en mano flugfoliojn pri Esperanto kaj pri la venontaj kursoj por komencantoj.

pli paroli kaj fariĝi pli varbemaj: mi decidis disdoni flugfoliojn en la aleoj, kaj mi multege parolis (pro tio dum la du sekvintaj tagoj doloris mia gorĝo! -, sed fine mi estis kontentega pro la kontaktoj, kiujn mi havis tie .

Kontaktojn multajn ni havis kun ĉeestantoj por finfine igi la renkontiĝon sukcesa. Sekvas atesto de Jean-Claude, kiu en la franca al ni diras sian opinion.

*Cyrille*

Ĉiun jaron de tri jaroj Esperanto 80 havas budon en tiu fama renkontiĝo.

En 2002 kaj 2003 AGORA okazis en glitkurejo, sed ĉi tiun jaron respondeculoj decidis elekti alian lokon: la koncertejo malpli frida nomiĝanta «Mégacité».

La varmeco de la loko kuraĝigis nin

## AGORA: Un bonne cuvée 2004!

Une innovation: AGORA se déroulait cette année les pieds au chaud à Mégacité, au lieu de la patinoire du Colisée les années précédentes.

Résultat: on n'a pas eu besoin de mettre deux paires de chaussettes!

L'ambiance du coup était beaucoup plus chaude, et en plus il y avait de l'espace dans les allées pour que les badauds



Jean-Claude kvietega kaj... malfrida.

puissent se balader tranquillement. Comme les années précédentes, on a mis l'accent sur les jeunes et on en a rencontré beaucoup de très intéressés... qu'on n'a pas retrouvés lors de la première

réunion conviviale (sauf Renaud qui adhère à notre association et qui va démarrer l'apprentissage, mais qui ne pourra pas être des nôtres aux réunions).

Si je dois retenir un seul mot de cet AGORA, ce sera: SAUGRENU!

C'est ce que pense de l'espéranto une jeune étudiante. Les échanges furent très cordiaux et sans agressivité aucune. J'ai le sentiment qu'au fil des années, les états d'es-



Bernadette... ĉiam pretas (vidu postan ateston).

priĉanĝo pri la lingvo internacia en multo pli favorabla. Continuons! L'action dans le temps paie. Rendez-vous est pris pour AGORA 2005. Un grand merci à tous ceux qui ont participé activement à cette manifestation et un bisou spécial pour Fabienne qui se charge avec brio de la logistique et de l'intendance.

*Jean-Claude,  
Prezidanto de Esperanto 80*



Albert, fotita ĉe nia budo en AGORA, venis por deĵori en la budo de la SEL, sed tamen longe restadis en la nia budo...

## Renkonto en Arras kun klera Esperantisto



Régis parolanta kun s-ro Moirand.

Tuj post sendo de la antaŭa *Okdek-anoj ĉe l'papero*, tiun ĉi postan proponon mi ricevis de sinjoro Edmond Plutniak pri partopreno je prelego de Daniel Moirand pri *La Libro de la Mirindaĵoj* de Marko Polo, kiun li tradukis Esperanten:

«Kara AMIKO,

DANKON pro via interesa revuo kaj GRATULOJN por la laborego farita!

BONVOLU informi perrete ĉiujn viajn

klubanojn pri tre interesa prelego, kiun ni organizas en Arras venontan sabaton (en la sama loko kie okazis la ekzamenoj):

Sabaton 11a de septembro 2004 je la 15a horo en Office Culturel, 61 grand Place en Arras, Daniel Moirand prelegos pri la vojaĝoj de Marko Polo. (Daniel Moirand venos de Aix-en-Provence, en kies Universitato li instruis dum pluraj jaroj Esperanton, li ankaŭ verkis plurajn librojn en Esperanto kaj tradukis la tre interesan libregon de Marko Polo). Do, espereble ĝis sabato en Arras!

Plej Amike,  
Edmond Plutniak».

En Arras, do, iris mi kaj Bernadette, per ŝia aŭtomobilo. Post unu-hora veturado ni atingis Arras-on.

Jam malfruaj ni estis. Sur la Granda

placo de Arras sidis varma etoso pro sporta animado per nuntempaj tre laŭmodaj 4-radaj motorcikloj.

Tamen park-lokon ni finfine trovis.

La aranĝo okazis la 11an de septembro en la sama loko, en kiu okazis la juliaj ekzamenoj, sed en ĉambro pli vasta ol tiuj uzitaj dum la ekzamenoj, kiuj estis pli intimaj kaj etaj ĉambroj.

Jam komenciĝinta estis la prelego. Tie ankaŭ venis Régis, kiu sidis en la malantaŭa parto de la ĉambro. Liberan seĝon ni prenis kaj sidiĝis por aŭskulti pacience kaj atente la vortojn de sinjoro Moirand.

Li parolis pri sia ekkono de la libro, kaj pri la kialoj, pro kio li decidis lerni Esperanton, kaj poste traduki la libron el la franca Esperanten. Notinde, estas la fakto ke Daniel moirand estis instruisto

pri la rusa lingvo, kaj ke li parolas multajn lingvojn (ekz. la Mongolan), sed pri tio li ne deziris pavi (serĉu en la PIV ;- ) per preciza elkalkulo de la nombro de parolataj lingvoj.

Malfacile estis atenti pri ĉiuj diraĵoj, ĉar lia lingvo ne estis simplega. Tio montras, ke li regas la lingvon entute (emfazajo: li verkis tutan libron pri la nuna uzado de l' akuzativo).

Trankviliga post anekdoto en Esperanto pri Marko Polo de s-ro Moirand estis la traduko francen far Edmond.

Mi mem iel perdiĝis pro miskompreno de vortoj. Ekzemple, mi ne bone komprenis la vorton «ĥano», kiun mi ne konis kaj ne sukcese asociis al kontata aĵo. Mi ja konis la vorton «rano» (grenouille), sed ne komprenis la ligon inter Marko Polo kaj iu «rano». Fakte «Ĥano» (ĝuste prononcita de la preleganto «Ĥano» kaj ne «Rano») estis la nomo koncizigita kaj esperantigita de la fama *Kubilaj Kan* (aŭ *Kubilaj Ĥan* – fr. *Koubilaï Khan*), Imperiestro de Ĉinio dum la 13-a jarcento.

Cyrille



Post la finiĝo de la prelego.

## Unua gasta kunveno en la «Tilioj» de Salouël



Atentemaj estis membroj de *Esperanto 80*

Nia unua renkontiĝo inter membroj de *Esperanto 80* en 2004–2005 okazis en la ĉambro de la «Tilioj» en Salouël.

Tiu ĉi novjara gasta kunveno estis speciala: novajn gastojn ni ricevis. Venis ili pro scivolemo aŭ jam nepre kun volo lerni Esperanton. Parolis Jean-Claude pri Esperanto je la sesa posttagmeze. Poste okazis ĉe-tabliĝado dum kiu ni parolis pri la asocio, ties voloj, ties projektoj, ktp.

Jean-Claude parolis pri la nuna stato de la asocio farante moralan raporton.

Daniel raportis pri la kursoj kaj pri la kason, kaj mi parolis pri la ĵurnalo, kaj pri la TTT-ejo, kiun mi fine deziras realigi per SPIP-teknologio.

Christelle post longa foresto denove ĉeestis inter ni por manĝi. Ŝi laboris dum pluraj monatoj en *Disneyland Paris*, en kiu ŝi telefone al nederlandanoj vendadis restadojn en la fama kaj mirinda distreĝejo sidanta apud Parizo. Ŝi parolis al ni pri la tiea multega (ĉu tiel mirinda?) laborado, kiu lacigis ŝin, kaj ne permesis al ŝi multe enspezi monon. Tamen tiu laboro donis al ŝi seriozan sperton pri vendado per telefono uzante la nederlandan lingvon, kaj al ŝi malfermis pordojn.

Dum la dua parto de la vespero al ni klarigis Xavier Dewidehem la kialon de sia ĉeesto inter okdekanoj. La Nordo-Federacion la respondeculoj de Nord-regiona Esperantistaro refundis.

Ili deziras per ĝi (1) reklami por esperanto, kaj (2) fondi novajn rilatojn inter Esperantoparolantoj de Nordo-regiono kaj Pikardio, kaj tiel (3) subteni kaj kunordigi agadojn de aliĝintaj asocioj, kaj (4) reprezenti niajn regionojn en naciaj E-instancoj.

Xavier prezentis al ni la statutojn de tiu supra E-asocia federacio, kiun ni atenteme aŭskultis. Estrara kunveno de *Esperanto 80*, verŝajne okazos en decembro pro tiu propono, kiu enhavas avantaĝojn kaj malavantaĝojn.

Jen, sen plia prokrasto, la atesto de Jean-Claude.

Cyrille

### Atesto de Jean-Claude

Lors de notre première réunion conviviale, nous avons eu le plaisir d'accueillir mesdames Lydia Juguet, Christine Trancart, Ségolène Auchet et Julie et monsieur Michael Harvey. Renaud également nous rejoint dans nos actions et pour l'étude de l'espéranto mais ne pourra pas être des nôtres au cours des réunions et cours le vendredi soir en raison de son activité escrime. Nous espérons que d'autres personnes viendront démarrer l'étude de l'espéranto à compter du vendredi 22 octobre de 18 heures à 19 heures 30 salle des Tilleuls, derrière la mairie de Salouël.

Jean-Claude,  
Prezidanto de *Esperanto 80*



Jean-Claude parolanta al nova amikino lia.



Xavier Dewidehem kaj Lætitia.



Christelle venis de Parizo por manĝi kun ni.



Michael Harvey kun Günter kaj lia edzino.



## **Les suites de l'affaire Giorgio Pagano (voir le supplément du n°5): l'espéranto enseigné en Italie.**

### **Esperanto instruota al lernejoj en Italio**

En Esperanto: Okazis unua kunsido inter la itala Ministerio pri Klerigado kaj la «Esperanto» Radikala Asocio (ERA) pri eksperimenta instruado de Esperanto al lernejoj.

La kunveno de la 18a de junio okazis post interkonsento de la ministerio kaj ERA pri la lanĉo de eŭropa eksperimentado pri la internacia lingvo.

**Lernu lingvojn pli facile per Esperanto**  
La eksperimentado celas pruvi la propedeŭtikan rolon de Esperanto. Oni intencas evidentigi, ke la internacia lingvo helpas kaj antaŭhelpas la lernadon de ajna fremda lingvo.

### **Instruado en bazlernejoj**

La projekto koncentriĝos al la unua-gradaj lernejoj. Tie al infanoj inter 6 kaj 14 estos instruata Esperanto. Ne nur la lernantoj, sed ankaŭ la instruistoj partoprenos specialan trejnadon, kiu preparas ilin por la instruado.

### **Projekto gvidata de Esperantistoj**

La ĉefa kunordiganto de la projekto estas «Esperanto» Radikala Asocio, kiu zorgos pri la plej multaj kondiĉoj.

*El la redakcio de esperantoland.org*  
la 13an de Julio 2004

## **Pour les universitaires hongrois l'espéranto est bien une langue vivante: elle fait désormais partie intégrante du cursus.**

### **En Hungario: «Esperanto vivas»**

En Esperanto: La fakuloj de la hungaria Ministerio pri Instruado konstatis, ke Esperanto vivas kaj apartenas al la vivantaj lingvoj. Krom la morala profito la konstato havas praktikajn avantaĝojn por Esperanto.

En Hungario por akiri diplomon oni bezonas 1 (por altlernejoj) aŭ 2 (por universitatoj) lingvajn ekzamenojn el t.n. vivantaj lingvoj. Esperanton intertempe elektas ĉirkaŭ 5 procentoj de la studentoj — la lingvo havas tiel la trian lokon post la angla kaj la germana. Pro la transformiĝo de la lerneja sistemo la homoj, kiuj nuntempe komencas aŭ

finas siajn universitatajn studojn, plej ofte havas eĉ ne unu lingvan ekzamenon. Por ili Esperanto estas granda helpilo pro sia facileco.

La ministerio sendis sian opinion kiel cirkuleron al ĉiuj universitatoj, kio signifas preskaŭ-devigon akcepti inter aliaj lingvoj ankaŭ Esperanton.

*El la redakcio de esperantoland.org*  
la 28an de Marto 2004

### **Volontulo serĉata pro neatendita sukceso en Indonezio**

En Esperanto: Pro la neatendita intereso pri kurso de Esperanto en la indonezia lingvo oni serĉas volontulon, kiu povos belaspektigi la kurson por la retpaĝaroj de TEJO/UEA. Utilos iom da scio pri vikioj, sed supozeble ne necesas kompreni la indonezian lingvon.

### **Artikolo vekis Indonezion lerni Esperanton**

Hazairin R. Junep pretigis kurson de Esperanto en la indonezia lingvo. Li aperigis artikolon en indonezia scienca revuo pri la nova kurso kaj ekde la apero de la artikolo li ricevas amason da petoj pri lernado de Esperanto.

*El la redakcio de esperantoland.org*  
la 15an de Majo 2004

## **Une nouvelle université ayant l'espéranto comme langue d'enseignement est ouverte...**

### **Libera Eŭropa Universitato en Esperanto**

En Esperanto: Fine de aŭgusto en Kormarno, Slovakio, oni inaŭguros Liberan Eŭropan Universitaton Kelemantia-privatan institucion, kiu komence konsistos el kvar fakultatoj; oni instruos en la germana kaj en Esperanto.

La universitato aktive okupiĝos pri internacia kaj interkultura komunikado. La Akademio Internacia de la Sciencoj, AIS San-Marino estos grava organizanto de la nova institucio; la rektora triopo konsistos el la AIS-profesoroj Eva Poláková, Helmar Frank kaj Reinhard Selten, nobelpremiulo pri ekonomiko.

### **Universitato festas per sesioj**

Por festi la inaŭguron okazos du sinsekvaj Someraj Universitataj Semajnoj de la 25-a de aŭgusto ĝis la 8-a de septembro 2004. En tiu tempo okazos kultura programo, gvidataj ekskursoj al la regiono kaj al la proksimaj eŭropaj ĉef-

urboj, lingvokursoj kaj kerne la scienca programo de SUS 27, la ĉi-jara San-marineca Universitata Sesio de AIS.

Laŭ la jamaj aliĝoj SUS 27 estos unu el la plej grandaj aranĝoj de AIS ĝis nun. Pro la riĉa kadra programo ĝi estos interesa ne nur por sciencistoj kaj science interesitaj homoj — AIS invitas ĉeesti tiun eventon kaj konatiĝi kun bela regiono en la koro de Eŭropo.

*El la redakcio de esperantoland.org*  
la 30an de Majo 2004

## **Encore une «bonne nouvelle» qui intéresse aussi les francophones...**

En français: Une professeur de physique d'une université de Caroline du Nord (USA) travaille depuis des années sur des logiciels de reconnaissance et de traduction vocales. Elle a étudié les sons des langues les plus en vogue dont l'anglais, l'espagnol, l'italien, le russe... avant de se pencher sur la langue internationale espéranto.

Conclusion, cette dernière est la plus adaptée à l'informatique. Dans un article récent sur le choix d'un langage mondial, titré «Ne pariez plus sur le triomphe de l'anglais» elle affirme cette adaptabilité informatique qui pourrait un jour détrôner le monopole linguistique actuel.

*Stargate magazine n°2*

*Cité par Okazas (Juillet-Août 2004).*



Afganaj studentoj kreis Esperanto-asocion.

## **Nova esperanto organizo naskiĝis en Afganio**

En Esperanto: En Afganio naskiĝis l'AAAdEM: Afgana Amika Asocio de Esperanto-Movado. Ĝi celas amikecon per Esperanto kaj sidas en universitato en Kabulo. Ĝin kreis junaj studentoj de la universitato (ili estas inter 20 kaj 23 jaraĝaj).

Ilin vi povas kontakti per tiu ĉi simpla rimedo: [aaadem\\_kabul@yahoo.com](mailto:aaadem_kabul@yahoo.com).

*El la reto*  
la 30an de septembro 2004